Rafael Henrique Zerbetto

estas literaturisto, prezidis BEJO-n (Brazila Esperantista Junulara Organizo), organizis esperanto-kongresojn en Brazilo, estas komitatano-A por Brazilo kaj konsiliano de UEA. Kadre de eksteraj rilatoj, li reprezentis nian movadon en la Jarkunveno de UN-Fakgrupo pri Junularo kaj Infanaro kaj Rio+20, ambaŭ en 2012, kaj en la Monda Junulara Konferenco en 2014, kiam li sukcesis enkonduki proponojn pri lingvaj rajtoj al la Deklaracio de Kolombo. La postdiploma kurso en Poznano permesos al li pli efike agadi en la movado, kiu postulas bonan konon de esperanta kulturo kaj lingvistikaj temoj, kaj ankaŭ estos gravaj por lia profesia vivo, ĉar li celas labori kiel universitata profesoro por esplori kaj instrui pri esperanta kulturo kaj internacia komunikado.
Filmeto: http://youtu.be/1opStVNTXwQ